venis mallaŭdantaj kaj profetantaj nur malbonon ĝojiĝis kaj kontentiĝis, kaj en la fino regis la sento ke la kongreso estis ŝatinda sukceso. Lasante al la oficiala sekretario kaj la oficiala parto la priskribon de la pure oficialaj agoj de la kongreso, ni priskribos iome la aliajn aferojn. Por pli protekti niajn samideanojn kontraŭ la ebla inklino de nia propra rakontanto trograndigi ĉion esperantistan ni ĉerpos pogrando el *The Daily Chautauquan*:

*Dimanĉo, Oka de Aŭgusto.*

Je la tria kaj duono la Aŭlo Higgins, bone konata de tiuj kiuj ĉeestis la lastjaron kunvenon, estis preskaŭ plena je Esperantistoj kaj iliaj amikoj, kaj la granda nombro da vizaĝoj ne ankoraŭ viditaj inter ni estis ĝojiga atesto pri la kreskado de la lingvo en Ameriko. La programo de la servo estis donacita de *The Christian Herald*, el Nov-Jorko, kaj aranĝita, kun tradukoj de la himnoj, de Rev. A. Krafft, el Chicago, kaj Sinjorino Wilbur F. Crafts, el Washington urbo. Pastro S. H. Day, el Chautauqua, kondukis la servon, kaj Prof. Christen faris paroladon pri la interpacigo de la nacioj per Esperanto. Sengene kaj senhezite la ĉeestantoj legis la respondojn kaj parolis la vortojn de la kantoj. La spirito de la diservo, kaj la granda nombro ĉeestanta forigis ĉiun dubon pri la sukceso de la kongreso kaj plenigis ĉiujn korojn per ĝojo kaj konfido.

*Lundo.*

La formala malfermo de la Dua Kongreso de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko okazis en la Amfiteatro je la dek-unua lundon matene.

La bonvena parolado je la nomo de Chautauqua estis farita de Sro. Bray al la Esperantistoj kunvenintaj en kongreso en tiu la dua kunveno por disvastigi la propagandadon de la nova internacia lingvo en Ameriko, kiu estas ankoraŭ iom nekulturita kampo. En lia bonvena parolado Sro. Bray priparolis la servon

syng only trouble cheered up and became contented, and in the end there reigned the feeling that the congress had been a complete success. Leaving to the official secretary and the official part the description of the purely official acts of the congress, we shall describe to some extent the other happenings. To protect our readers against the possible inclination of our own *rakontanto* to exaggerate every thing concerning Esperanto, we clip at length from *The Daily Chautauquan*:

SUNDAY, AUGUST 8TH.

At half past three Higgins Hall, well known to those who attended the convention last year, was nearly filled with Esperantists and their friends, and the great number of faces not previously seen among us was a pleasing testimony to the growth of the language in America. The program for the service was donated by the *Christian Herald*, of New York, and arranged, with translations of the hymns, by Rev. A. Krafft, of Chicago, and Mrs. Wilbur F. Crafts, of Washington, D. C. Rev. S. H. Day, of Chautauqua, conducted the service, and Prof. Christen made an address on the pacification of the nations through Esperanto. Easily and promptly those present read the responses and pronounced the words of the songs. The spirited character of the service and the large number present drove away every doubt as to the success of the congress and filled all hearts with joy and confidence.

MONDAY.

The formal opening exercises of the Second Congress of the Esperanto Association of North America were held in the Amphitheater at 11 o'clock Monday morning.

The address of welcome on behalf of Chautauqua Institution was made by Mr. Bray to the Esperantists in Congress assembled in this their second meeting to spread the propaganda of the new International Language in America, which is as yet rather an unworked field. In his address of wel-

kiun Chautauqua estas farinta por tiu ĉi movado al solidariĝo de la mondo, citante speciale la fakon de Esperanto en la somera lernejo, la kurson de lecionoj kiuj estas aperintaj en *The Chautauqua* dum la jaro, kaj la bonegan provizon da esperanta presaĵo vendata de la libro-vendejo de Chautauqua.

Sro. Bray diris, ke Chautauqua tre ĝojis bonvenigi la esperantistojn al sia urbo por la dua fojo. "La bonveno ne estas nur ĝentilaĵo," li diris, "ĉar jam antaŭe ni havis kun ni la esperantistojn." Priparolante pri ĉiuj aliaj grandaj asocio kiuj estis kunvenintaj en Chautauqua de tempo al tempo, ekzemple la Internacia Asocio Edukista, la Asocio por Religia Edukado, la Kongreso de Patrinoj, kaj la Kongreso de Misiista Studado, la parolanto asertis, ke Chautauqua neniam havis pli entuziasman aron da propagandistoj ol la esperantistoj, aldonante ke lastjare ilia entuziasmo estis tiel granda ke ili havigis al si varbitojn eĉ inter la laborantoj de la Instituto.

Pri la prospektoj de la lingvo Esperanto, la parolanto diris ke, kvankam ĝi havas la ŝajnon de mortinta lingvo, ĝi jam akiris la reputacion pri fortega viveco, kaj kompare kun simpligita (angla) ortografio, ĝi jam superas tion sufiĉe. La bezono de internacia lingvo estas malpli forte sentata en Ameriko ol en Eŭropo, kie por faciligo de vojaĝado unu komuna lingvo, en kiu oni publikigus fervojajn informojn, estus grande helpa.

Sro. Bray kritis konversacion kiun li havis lastan printempon kun Sro. Stead, ĉefa redaktoro de la *Londona Review of Reviews*, en kiu li demandis ĉu, laŭ la opinion de Sro. Stead, Esperanto posedas la necesajn elementojn de daŭreco kaj adaptebleco. Sro. Stead diris ke, laŭ komparo kun aliaj sistemoj inventitaj, ĝi ŝajnis posedi la elementojn de daŭreco. Unu malfacilaĵo en la starigo de tia sistemo estas la kontraŭstaro de personoj

come Mr. Bray referred to the contribution which Chautauqua has made to this movement for world unity, mentioning in particular the department of Esperanto in the summer schools, the Esperanto course which has been running through *The Chautauquan* during the year, and the excellent collection of Esperanto material handled by the Chautauqua Book Store.

Mr. Bray said Chautauqua was glad to welcome the Esperantists to Chautauqua for the second time. "The welcome is not perfunctory," he said "for we have had them with us before." Referring to all the other great associations that have met at Chautauqua from time to time, such as the National Educational Association, the Religious Educational Association, the Mothers' Congresses, and the Mission Study Congresses, the speaker asserted that Chautauqua has never had a more enthusiastic set of propagandists than the Esperantists, adding that their enthusiasm last year had been so great that they had even made converts among employees of the Institution.

As for the prospects of Esperanto itself, the speaker asserted that while it had the appearance of a dead language it had already acquired the reputation of being very much alive, and that as for simplified spelling, it had the latter beaten to a frazzle. The need of such a language is less strongly felt in America than in Europe where for ease in traveling a common language in which could be written railroad signs once for all, instead of in three tongues as now, would be a great convenience.

Mr. Bray referred to a conversation which he had last spring with Mr. Stead, editor of *London Review of Reviews*, in which he asked whether, in Mr. Stead's opinion, Esperanto possessed the necessary elements of permanence and of general adaptability. Mr. Stead said that, as compared with other systems that had been invented, it seemed to have the elements of permanence. One difficulty with the putting out of such a system is the opposition of people who

kiuj pensas, ke ili povas produkti pli bonajn sistemojn; kaj ankaŭ estas provoj de aliaj kunigi siajn proprajn nomojn al la lingvo per la enpuŝo de ŝanĝoj. Sro. Stead estis dirinta, ke neniam antaŭe estis kondiĉoj tiel favoraj por tia lingvo kiel nun, ke neniam antaŭe ekzistis tiel mondolarĝa sento de komuna homeco; kaj pri la praktikebleco, la sperto de tiuj, kiuj estis uzintaj ĝin, deklaris Sro. Stead, montris ĝin malpli artifiziala ol iu el ĝiaj antaŭaĵoj.

Sro. Bray, parolante mallonge pri la stato en Ameriko, montris la fakton, ke la Tutamerika Scienca Kongreso en Januaro montris progresman sintenadon pri la enkonduko de Esperanto en la publikaj lernejoj, kaj petis, ke Usono faru iniciativon vokante mondo-kongreson por konsideri la aferon. "La stato de aferoj en Ameriko," diris Sro. Bray, "estas iome malfacila, ĉar la plimulto el ni ne sentas la premadon de alia lingvo, sed Esperanto havus grandan valoron en la helpado de tiuj pli intimaj rilatoj kun la sudamerikaj kaj hispan-lingvaj landoj, al kiuj ni esperas.

Respondon je la nomo de la Esperantista Kongreso faris Sro. Papot, kiu dankis la Instituton por la oficialan rekonton kiun Chautauqua donis al Esperanto. "Tio ne signifas," diris Sro. Papot, "ke Chautauqua forprenos la propagandadon el niaj manoj. Tiun laboron devos fari ni Esperantistoj. Sed estas bona signo ke tiu ĉi intelektema centro donas sian spiritan kaj materialan aprobon." Li esprimis sian plezuron ke la kongreso kunvenas en Chautauqua, ĉar li sentas ke estas plimulte da espero por la disradiado de la spirito de Esperanto tra la lando per la speco de homoj kiuj kunvenas tie ĉi, ol per alia.

La afero de Esperanto, li diris malkaŝe, rekontas multan malfacilaĵon en Ameriko pro la amerikana sento de aparteco, la tera grandeco de la lando, kaj tiu spirito kiu diras: "Se vi volas trakti aferojn kun mi, kial vi ne parolas

think they can bring out better systems; and then there are the attempts of others to attach their own names to the system by introducing changes. Mr. Stead said that never were conditions so favorable for such a language as now, never was there such a world-wide feeling of a common humanity; and, as for its practicability, the experience of those who have used it, declared Mr. Stead, would indicate that it is far less artificial than any of its predecessors.

Mr. Bray, speaking briefly of the situation in America, referred to the fact that the Pan-American Scientific Congress in January took advanced ground in reference to the introduction of Esperanto into the schools, and asked the United States to take the initiative in calling a world congress to consider the matter. "The American situation," said Mr. Bray, "is somewhat difficult, because the most of us do not feel the pressure of some other language, but Esperanto would be of great value in the forwarding of those closer relations with the South American and Spanish countries, towards which we are looking."

The response in behalf of the Esperanto Congress was made by M. Papot, who thanked the Institution for the official recognition which Chautauqua has given to Esperanto. "That does not mean," said M. Papot, "that Chautauqua is going to take this propaganda off our hands. We Esperantists must do that. But yet it is a good sign that this intellectual center grants its moral and physical support." He expressed his gratification that the Congress meets at Chautauqua because he feels that there is more hope for a radiation of the spirit of Esperanto throughout the country from the class of people who meet here than from any other class.

The cause of Esperanto, he asserted frankly, has a hard time in America because of the American feeling of aloofness, the physical size of the country and the spirit that says, "If you want to do business with me why don't you talk English?" his spirit, he declared,

angle?" Tiu spirito, li diris, devas antikviĝi. Devas enveni pli forta sento de la solidareco, kiu estas priskribita kiel la respondeco de ĉiu por ĉiuj, kaj de ĉiuj por ĉiu. Tiu ideo, li diris, kiu kreskas en la tuta mondo, estos plifortigita per la akiro de interkomunikilo, kaj tia ilo, laŭ lia opinion, sin trovas en Esperanto. "Tiam," li diris, "vi ne plu sentos vin sola ĉar vi estas fremdulo." Povas esti kritikado, li konfesis, al Esperanto el la vidpunkto de scienca precizeco. "Sed," li diris, "estas limoj al pura scienco, kaj unu el tiuj aferoj kiujn la pura scienco ne povas envadi estas la poezion de la parolado, kaj la povon de la sentimento. Scienco ne estas la sola afero laŭ kiu lingvo devas esti analizita. Ni havas lingvon kiun milionoj da homoj nun amas ĉar ĝi estis donacita laŭ la spirito de simpleco kaj bonvolo, de unu kiu ne eĉ retenis al si rajtojn de represado de siaj propraj verkoj."

London posttagmeze okazis kunveno por la akcepto de oficialaj reprezentantoj de neesperantistaj institucioj. Sro. W. L. Spillman, el Washington, reprezentis la Fakon de Terkulturo de la Usona Registaro, kaj faris tre interesan paroladon. Li diris, inter aliaj rimarkoj, ke nun ekzistas multaj gravegaj sciencaj verkoj kiuj ne povas publikigi pro tio, ke tiel multekosta estas la presigo kaj tiel malgranda la vendado kiam presitaj per unu nacia lingvo, estas afero nebla eldonigi ilin.

Sro. Lisle Terwilliger, el la Naŭa Divizio, Fervoja Poŝta Servo, reprezentis la Poŝtan Fakon de la Usona Registaro, kaj venis por fari observadon kaj doni raporton al la Poŝtestro Ĝenerala. Li parolis al la kunveno pri la organizo kaj funkciado de la Universala Poŝta Unuiĝo, kaj klarigis ke, kvankam estas tre malfacile atingi tiun institucion, estus grandege grave havigi el ĝi ian atenton pri Esperanto.

Sro. Virgil C. Dibble, Jr., el Charles-

should be antiquated. here should come in a greater sense of solidarity, which has been defined as the responsibility of all for each and each for all. That idea, he asserted, which is growing all over the world will be fostered by the acquisition of a medium of communication, and such a medium of communication, in his opinion is to be found in Esperanto. "Then," said he, "you will not feel lonesome because you are a for-eigner." There may be criticism, he admitted, of Esperanto from the standpoint of scientific accuracy. "But," said he, "there are limits to pure science and one of the things that pure science cannot invade is the poetry of speech, and the power of sentiment. Science is not the sole criterion by which any language should be analyzed. We have a language that millions of people love now because it was given in the spirit of simplicity and good will by one who did not even retain the copyright of his own work."

Monday afternoon there was a meeting for the reception of official representatives of non-Esperantist institutions. Mr. W. J. Spillman, of Washington, represented the Department of Agriculture of the United States Government, and made a very interesting speech. He said, among other remarks, that there now exist many extremely important scientific works which cannot be published because the printing is so expensive and the sale so small when they are printed in only a single national language that it is impossible to publish them.

Mr. Lisle Terwilliger, of the Ninth Division, Railway Mail Service, represented the Postal Department of the Government, and came to make observations and give a report to the Postmaster General. He spoke to the convention on the organization and functions of the Universal Postal Union, and declared that, though it is very difficult to reach that institution, it would be immensely important to secure from it some notice of Esperanto.

Mr. Virgil C. Dibble, Jr., of Charles-



ton, South Carolina, reprezentis la Ŝtatan Direktoron de Publika Instruado, kaj legis longan kaj lerte verkitan paroladon pri la Edukaca Valoro de Esperanto.

La sekretario de la Asocio raportis pri la ricevo de grandega nombro da salutantaj kaj aprobantaj leteroj el universitatoj, Ŝtataj direktoroj de publika instruado, k. t. p.

Kolonelo Pollen, el la Brita Armeo, prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, ĉeestis tiun ĉi kunvenon kaj faris mallongan sed tre interesan paroladon.

#### *Mardo.*

Kun Kolonelo Pollen en la antaŭ vico, portanta la silkan esperantan standardon, kiun li portis tra la tuta mondo kun si, longa linio el delegitoj portantaj verdajn montrilojn formiĝis ĉe la poŝta oficejo mardon matene kaj marŝis en duopa linio al Kolegia Monteto, kie fariĝis la ceremonio por la leviĝo de la esperanta standardo. La grandega verda standardo kun la verda stelo sur blanka kampo ĉe la angulo, flirtis gaje en la venteto kiam Kolonelo Pollen levigis ĝin al la supro de la stango, kie ĝi flirtos dum la sekvantaj tagoj de la Kongreso. Sub ĝi kelkaj paroladoj estis faritaj de eminentuloj en la movado.

La estro de la ceremonio estis Sro. J. D. Hailman el Pittsburgh, kaj la parolantoj estis Kolonelo Pollen, la prezidanto de la Brita Esperantista Asocio; Sro. E. E. Laberee, el Ottawa, Canada; Sro. Virgil C. Dibble, el Charleston, South Carolina, reprezentanto de la ŝtata direktoro de publika instruado; kaj Sro. W. J. Spillman, el la registrara Fako de Terkulturo. Sro. Hailman, komencante la ceremonion, diris, ke kvankam antaŭ unu jaro, kiam la esperantista standardo estis levita sur tiu sama loko estis nur kelkaj centoj da esperantistoj en Ameriko, estas nun kelkaj miloj.

Kolonelo Pollen, dankante la Kongreson pro la privilegio levi la standardon por ĝia kunveno, montris la standardon kiun li portas kun si. Li diris,

ton, South Carolina, represented the State Superintendent of Public Instruction, and read a long and skillfully written speech on the Educational Value of Esperanto.

The secretary of the Association reported the receipt of a great number of letters of greeting and approval from universities, state superintendents of public instruction, etc.

Colonel Pollen, of the British Army, president of the British Esperanto Association, attended this meeting and made a short but very interesting speech.

#### TUESDAY.

With Col. Pollen in the front ranks holding up the silk Esperanto flag which he has carried all over the world with him a long line of green badged delegates formed in line at the Post Office Tuesday morning and marched in double file to College Hill, where the ceremony of raising the Esperanto flag was performed. The large green flag with the green star in a white field at the corner, floated gayly in the breeze as Col. Pollen hoisted it to the top of the staff, here it will float during the remaining session of the Congress, and under it several addresses were made by men prominent in the movement.

The chairman of the exercises was Mr. J. D. Hailman, of Pittsburg, and the speakers were Col. Pollen, the president of the British Esperanto Association. Mr. E. E. La Barea of Ottawa, Canada; Mr. Virgil C. Dibble of Charleston, S. C., the representative of the South Carolina state board of education, and Mr. W. J. Spillman, of the Department of Agriculture. Mr. Hailman in opening the exercises declared that while a year ago, when the Esperanto flag was raised at the same place, there were only a few hundred people in America who were Esperantists, there are now several thousand of them.

Col. Pollen in thanking the Congress for the privilege of being the one to raise the flag on its sessions displayed the flag which he carries with him and said that while in his journeys down



KELKAJ ESPERANTISTOJ ĈE CHAUTAQUO

- (From left to right)
- FRONT ROW.** Miss Gaylord, Miss Case, Miss Cox, Miss Hay, Mr. Reed, Miss N. Gaylord.
- SECOND ROW.** Mrs. Hamilton, Miss Hoffman, Mrs. Sherman, Mrs. Williams, Mrs. Cowles, Miss Robison, Miss ———, Miss ———, Miss Rochler.
- THIRD ROW.** Miss Brown, Mr. Burita, Mr. Clarke, Prof. Papot, Mr. Hailman, Mr. McKirdy, Mr. Armstrong, Pastro Kubacki, Dr. Hamilton, Mr. Fisher, P.



**A—SOME ESPERANTISTS AT CHATAUQUA.**

(o right of reader.)  
 chols, Miss Butler, Mr. Dibble, Miss Beatty, Miss ———, Mrs. Bowen, Mr. Laberce,  
 Meers, Miss Anacker, Mrs. Bryan, Miss Tobey, Colonel Pollen, Dr. Kellerman, Miss  
 Hetzel, Dr. Henry, Mr. Symes, Mr. Chase, Dr. Bosemer, Mr. Clifford, Mr. Neeld,  
 Prof. Christen, Mr. Baker, Mr. Kurtz, Dr. Simonek.

ke kvankam dum siaj vojaĝoj sur la Meza Maro, la Ruĝa Maro kaj aliaj orientaj akvoj li malsuprenigis tiun standardon pro ĉiuj la standardoj de aliaj nacioj, li esperas al la tempo kiam la standardoj de ĉiuj aliaj nacioj malsuprenigos antaŭ la verda standardo de

Sro. W. J. Spillman, el la registara Fako de Terkulturo, deklaris, ke la titolo "universala lingvo" kiu estas donata al Esperanto de eksteruloj estas malĝusta nomo, kaj ke la lingvo estas intencata sole kiel internacia lingvo per kiu rusoj kaj japanoj kaj amerikanoj povos, ne estante kleregaj lingvistoj, interkompreniĝi inter si, kie ajn ili renkontiĝas. Li diris, ke tiu lingvo estas unu al la plej gravaj helpiloj, kiujn iam posedis la scienco, ĉar scienca progreso neniam estas enfermata inter la limoj de unu nacio, kaj ke per Esperanto la sciencisto povas lerni tuj pri sciencaj eltrovoj en ĉiu parto de la mondo. Li profetis ankaŭ ke Esperanto estas destinita fariĝi la granda literatura lingvo de la mondo, kaj diris ke ĝi jam havas pli grandan aron da verkistoj, ol kelkaj naciaj lingvoj. Tradukaĵo el Shakespeare antaŭ nelonge aperinta, li diris, estas por li pli facile kompreneble ol la angla de la originalo, kaj la tempo venos, li deklaris, kiam la grandaj verkoj de literaturo estos verkitaj en Esperanto kaj havos la tutan mondon por legantaro.

Sro. Laberee, el Ottawa, Canada, parolis pri la komercaj utilecoj de Esperanto, kaj rakontis pri la grandaj ŝparoj kaj plimulta akurateco atingita per korespondado en Esperanto, kaj la ebleco forigi la tradukistojn. Sro. Dibble diris ke Esperanto estas parto el la laŭgranda malgrandiĝo de la mondo kaj la kreskanta deziro por pligrandiĝanta sciado, komunikado kaj interkomprenado kiu estas la celo de la nuna tempo.

Mardon vespere oni havis kunvenon por sociala amuzado. Sro. Arthur Baker, kiu prizorgis la aferon, malpermesis la uzadon de la angla lingvo por iu celo, kaj la tutan vesperon oni aŭdis nur Esperanton.

Fraŭlino McWilliams, el Texas, ludis

the Mediterranean, the Red Sea and other eastern water he has lowered this flag to all the flags of other nations he looked forward to the time when the flags of all other nations would be lowered to the green colors of Esperanto.

Mr. W. J. Spillman of the Department of Agriculture, declared that the title of the universal language which has been applied by outsiders to Esperanto is a misnomer and that it is intended merely as an international language by which Russians and Japanese and Americans when they meet at any place may understand each other without being accomplished linguists. He said that this language is one of the greatest aids science has ever had, because scientific progress has never been confined within the bounds of one nation, and by means of Esperanto the scientist is able to hear at once of scientific discoveries in any part of the world. He predicted that Esperanto is also destined to become the great literary language of the world and said that it already has in it more workers of literature than some national languages. A recent translation of Shakespeare, he said, is more intelligible to him than the English of the original, and the time will come, he declared, when the great works of literature will be written in Esperanto and have the whole world for an audience.

Mr. La Barea of Ottawa, Canada, spoke of the commercial advantages of Esperanto and told of the great savings and increased accuracy due to correspondence in Esperanto and the ability to do without interpreters. Mr. Dibble said that the Esperanto movement is a part of the gradual shrinking of the world and the growing desire for increased knowledge, communication and understanding which is the tendency at present.

Tuesday evening there was a meeting for social amusement. Mr. Arthur Baker, who had charge of the affair, forbade the use of the English language for any purpose, and the whole evening one heard only Esperanto.

Miss McWilliams, of Texas, played

pianoforton, kaj Fraŭlino Pilcher, el Chautauqua, violonon.

Sro. R. M. Chase, el Van Kleek Hill, legis la rakonton de Jerome K. Jerome pri la Meĥanika Dancisto, kaj ricevis grandan aplaŭdon de la aŭdantaro.

Sro. W. J. Spillman legis poemon verkitan de unu inda Esperantisto kies modesteco malpermesis la konigon de lia nomo.

Sino. Floro Williams kantis la "Juvolkanton" kaj "Florkanton" el la opero Faŭsto, kaj ricevis grandegan manifeston de la plezuro, kiun ŝi faris por la ĉeestantoj.

Sro. Burita, el Elgin, ridigis ĉiujn per tre humora rakonto pri "Eraro de la Justeco."

Dro. W. S. Hamilton, el Wheeling, deklamis la rakonton de Jesuo pri "La Malŝparema Filo." Li lerte ilustris ĝin per gestoj, tiel ke eĉ neesperantistoj povis bone sekvi la rakontadon, kaj kelkaj esperantistoj konsentis ke en neniu alia lingvo oni iam aŭdis la rakonton farita kun tiom da simpleco kaj forto. La Malŝparema Filo." La aŭdantaro korege elmontris sian aprobon kaj ĝuon de la deklamo.

Kiel finon al la plezuriga vespero, kvar sinjorinoj prezentis parton el malpeza propaganda teatraĵo aranĝita de Sinjorino Winifred Sackville Stoner, nomita "Esperanto, Reĝino de Lingvoj." La aktorinoj estis Sinjorinoj Sherman, Hamilton, Williams, kaj Bryan, el Wheeling, Dun la prezentado Sino. Williams kantis tiun familieran "japanan" kanteton pri amanto sur teokesto kaj amatino sur ventumilo. La kvar faris kanteton pri "Teo" kaj finis per strofon el "Ameriko." La produktaĵo, tiel malpeza kaj ĉarma, kaj farita preskaŭ sen preparado, faris bonan impreson sur la aŭdantaro, kiu kore aplaŭdegis.

Entute la vespero estis tre amuziga, kaj ĉiuj, komparante ĝin kun lastjaraj aferoj, povis konstati la grandan plibonigon de la maniero de parolo kaj la flueco per kiuj oni uzis la lingvon.

#### *Merkredo.*

Laŭ la programo de la kongreso, oni esperis havi balon merkredon nokte.

the piano, and Miss Pilcher, of Chautauqua, the violin.

Mr. R. M. Chase, of Canada, read the story of Jerome K. Jerome about "The Mechanical Dancer" and received great applause from the audience.

Mr. W. J. Spillman read a poem written by a worthy Esperantist whose modesty prevented the announcement of his name.

Mrs. Flora Williams sang the "Jewel Song" and "Flower Song" from the opera Faust, and received a great manifestation of the pleasure which she gave those present.

Mr. Burita, of Elgin, Ill., made everybody laugh with a very humorous story about "An Error of Justice."

Dr. W. S. Hamilton, of Wheeling, declaimed the story of Jesus about the Prodigal Son. He skillfully illustrated it with the gestures, so that even non-Esperantists could follow the story well, and several Esperantists agreed that in no other language had they ever heard the story told with such simplicity and strength. The audience heartily showed its approval and enjoyment of the declamation.

As a finish to the pleasant evening four ladies presented a part of a light propaganda play arranged by Mrs. Winifred Sackville Stoner, entitled "Esperanto, the Queen of Languages." Those taking part were Mmes. Sherman, Hamilton, Williams, and Bryan, of Wheeling. During the presentation Mrs. Williams sang the well-known "Japanese" song about the lover (on a tea-chest) and his sweetheart (on a fan). The production, so light and charming, and done almost without preparation, made a good impression on the audience, which heartily applauded.

On the whole the evening was very entertaining, and all, comparing it with the affairs of last year, could see the great difference in the manner of speech and the fluency with which they used the language.

#### WEDNESDAY.

According to the program it was expected to have a ball Wednesday night.

Tamen, voĉdonado inter la kongresanoj montris, ke nur malmultaj volis danci, kaj ke la granda plimulto preferus anstataŭigi la balon per boatveturado. Tial, oni preterlasis la dancon kaj je la sepa kaj duono vespere enŝipiĝis sur la boaton Mayville, kiu akceptis nur esperantistojn, kaj ĝis la deka nokte oni veturis sur la belega lago Chautauqua. Per kantoj kaj konversacio la tempo rapide foriĝis kaj estis malfacile kredi, kiam la ŝipestro ree kriis "Chautauqua!" ka la horoj tiel raplde forflugish.

#### *Ĵaŭdo.*

Teatra amuzado estis prezentita ĵaŭdon nokte sub la direktado de Sinjorino Linna Hennig Sherman, el Wheeling, W. Va., kies lerta kaj klerega laboro faris ĝin granda sukceso. Roloj en la ludo, "La Venko de l' Nordanino" verkita de Sro. William Morrison, F. B. E. A., kaj publikigita antaŭ nelonge en *The British Esperantist*, estis:

Percy Stephens, komizo ĉe makleristo en Londono—Arthur Baker, Chicago.

Effie Stephens, lia fratino, mastrumanta lian domon—Sino. Linna Hennig Sherman, Wheeling.

Renee d'Orival, esperantistino el Parizo—Sino. Flora Williams, Wheeling.

Mary, servistino en la domo de Stephens—Sino. J. W. Bryan, Wheeling.

La komedieto sin apogas sur la entuziasmo de Effie por Esperanto, de kio ŝi estas arda studentino, kaj la malestimo de ŝia frato por la internacia lingvo. Lia ĉagreno pro la proksimiĝanta vizito de la franca esperantista korespondantino de Effie, ŝanĝis sin en decidon eklerni la internacian lingvon kiam li renkontas Renee kaj farigas viktimo de ŝiaj ĉarmoj, sed ne povas interparoladi kun ŝi france. Li tuj eklaboras arde por lerni Esperanton, kaj post tri semajnoj li estas akirinta sufiĉe por amindumi ŝin per Esperantaĉo, kiam li estas akceptita de la juna fraŭlino per la plej perfekta Esperanto, kiun li komprenas tute bone.

Mallonga programo antaŭiris la drameton. Sro. James McKirdy, el Pittsburgh prezidis. Sro. Hetzel, el Filadelfio, faris legadon. Profesoro Christen donis kelkajn humorajn rakontojn en

However, a vote of the kongresanoj showed that only a few wished to dance, and a great majority would prefer to substitute for the ball a boat-ride. Therefore the dance was abandoned and at 7:30 in the evening they boarded the boat *Mayville*, which took on only Esperantists, and until ten o'clock steamed about on beautiful Lake Chautauqua. With songs and conversation the time passed rapidly, and it was hard to realize, when the captain called "Chautauqua!" that the hours had flown so fast.

#### THURSDAY.

A dramatic entertainment was given Thursday night under the direction of Mrs. Linna Hennig Sherman of Wheeling, W. Va., whose efficient and clever work made it a great success. Characters in the play, which was part in English and part in Esperanto were as follows:

Percy Stevens, stock-broker's clerk of London—Arthur Baker, Chicago.

Effie Stevens, his sister, who keeps house for him—Mrs. Linna Hennig Sherman, Wheeling.

Renee d'Orival, a Paris "Esperantistino"—Mrs. Flora Williams, Wheeling.

Mary, maid in the Stevens house—Mrs. J. W. Bryan, Wheeling.

The play hinges on Effie's enthusiasm for Esperanto, of which she is an ardent student, and her brother's scorn of the international language. His annoyance at the approaching visit of Effie's French Esperanto correspondent, Renee d'Orival, changes to a determination to learn the international language when he meets Renee and falls a victim to her charms, but is unable to converse with her in French. He immediately sets ardently to work to learn Esperanto, and in three weeks has acquired enough to be able to propose in what might be called broken Esperanto, whereupon he is accepted by the young lady in the purest Esperanto which he finds himself quite able to comprehend.

A short program preceded the play. Mr. James McKirdy of Pittsburgh presided. Mr. Hetzel of Philadelphia gave a reading, Professor Christen told some

Esperanto, kaj Fraŭlino Anacker, el Pittsburgh, faris Esperantan monologon pri virino en tramveturilo. Mallongan paroladon pri la adaptebleco de Esperanto faris Sinjorino Brown, el Asbury Park. Si ilustris ĝin per tradukoj el familiara angla poemo en Esperanton kaj familiara esperanta poemo en anglan. Pianoforton ludis Sro. R. M. Chase, el Kanado, kaj Sinjorino Meers, el Detroit. Fraŭlino Butler, el Nov-Jorko, ludis mandolenon.

### *Sabato.*

Sabaton matene je la sepa kaj duono granda partio da Esperantistoj forlasis Chautauqua per tramveturilo, ironte al Akvofalo Niagara. Ili pasis gaje la tempon inter Westfield kaj Niagara sur la bela linio de la Lagborda Fervojo, kaj post kelkaj horoj en la urbo Niagara apud la grandega akvofalo ili disiĝis. Kelkaj iris hejmen, aliaj daŭrigis la vojadon al Kanado por pasigi iom da libertempo. Ne ĉiuj esperantistoj iris al Niagara, kelkaj preferante iri rekte al siaj hejmoj el Chautauqua, dum aliaj restis por iom da tempo en Chautauqua.

Kvankam Chautauqua estas bela loko kaj oni povas tre pace pasigi tempon tie, la forta konvinko disvastiĝis inter la esperantistaro ke ĝi ne tute taŭgas por esperantista kunveno. Okazis kelkaj nefeliĉaj malkompreniĝoj kaj miksoj pri datoj kaj horoj por uzado de domoj. La Instituto mem havis konstantan necescon ŝanĝi siajn aranĝojn kaj pli ol unufoje tio trudis neviditan rompon al io esperantista. Tamen, antaŭ la fino ĉiuj gajiĝis kaj eliris ĝojantaj pro sia ĉeesto.

Pri la elekto de Washington kiel kongresan urbon por 1910—ne unu voĉo aŭdiĝis kontraŭ ĝi, kaj ni devos revivigi la faman batalkion de la sudlando dum la estinta milito: *Antaŭen al Vaŝington!* (Ni proponas, ke ĉiuj kiuj ne konas la sonon de la literoj “ng” en la angla lingvo parolu la vorton simple “vaŝinton,” aŭ “ŭaŝinton.”)

humorous stories in Esperanto, and Miss Anacker of Pittsburgh gave an Esperanto monologue, a street car scene. A short talk on the adaptability of Esperanto was given by Mrs. Brown of Asbury Park, and illustrated with translations of familiar English poetry into Esperanto, and familiar Esperanto poetry into English. Piano numbers were given by R. M. Chase of Canada, and Mrs. Meers of Detroit, and a mandolin solo by Miss Butler of New York.

### SATURDAY.

Saturday morning at half past seven a large party of Esperantists left Chautauqua by electric car to go to Niagara Falls. They passed the time gaily between Westfield and Niagara on the beautiful line of the Lake Shore Railroad, and after some hours in the city of Niagara near the great Falls they separated. Some went home, while others continued the journey to Canada to pass some vacation time. Not all the Esperantists went to Niagara, several preferring to go directly home from Chautauqua, while others remained for some time longer at Chautauqua.

Though Chautauqua is a beautiful place and one can very peacefully pass the time there, the strong conviction grew among the Esperantists that it is not at all the place for an Esperanto convention. There occurred several unfortunate misunderstandings and mixes on dates and hours for the use of buildings. The Institute itself was under the constant necessity of changing its arrangements, and more than once this forced an unforeseen break in some Esperanto affair. However, before the end everybody was in a good humor and went away rejoicing that he had come.

Of the election of Washington for the Congress City of 1910—not a single voice was raised against it, and we must resurrect the famous battle-cry of the Southland in the war: *On to Washington!* (We propose that all foreigners who do not know the sound of “ng” in the English language pronounce the word simple “vashington,” or “washinton”).



COLONEL POLLEN ADDRESSING ESPERANTISTS AT FLAG-RAISING—KOLONELO  
Pollen Parolanta al Esperantistoj ĉe Levigo de la Standardo

### SPEECH OF COLONEL POLLEN.

*From the Chautauqua Daily, August 11.*

"Esperanto has past through the first stage of ridicule, is now in the stage of discussion, and is approaching the third stage of adoption." Such was the analysis of the situation of Esperanto, the new International language, made by Colonel Pollen, in the Hall, Tuesday afternoon, in an address in which he brought the greetings of the British Esperanto Association of which he is president, to the Second American Esperanto Congress. "I am looking forward to the time," he said, "when Esperanto will be adopted by all the nations of the world as a secondary language."

The time is past, he declared, when Esperantists need explain that Esperanto is not a new kind of grass, as Lord Harris, former governor of Bombay, and England's most famous cricketer, supposed, confusing Esperanto and Esparto. The speaker asserted that there will

never be a day when any national language will become an international medium of communication. "We must get over the idea," he said, "that Esperanto will interfere with the spread of our mother tongue. The English have some cause to be proud of their language, but English will never be the language of the world. The future must be judged from the past. If English progresses at her present rate with the Carnegie millions at her back and Roosevelt's simplified spelling pushing her on she will not win her way in a thousand years. Other nations are coming to the front. I myself heard the German Emperor say that German is going to be the coming language. No national language has any chance of being accepted by the world at large even as a secondary language.

#### NEUTRALITY AND SIMPLICITY.

The language must be a neutral language and an easy language, the speaker declared. "The two essentials," he said,



"are neutrality and comparative ease of acquirement. We know that Esperanto is an easy language. Now when I say that, of course, I understand that I am talking to people of some intellectual calibre. I have studied many languages and it is the easiest language I ever had anything to do with. It is as easy as any language can be, but it will not walk into your head. It makes the smallest possible demand upon your time. I am getting tired of hearing people say that they have not time to learn it. The people who have learned it the best are the busiest people I know. A half hour a day for a couple of months will put you on a fair way of becoming master of the language."

Colonel Pollen met the objection that Esperanto is merely another language added to the present Babel of languages. "Esperanto," he said, "is, truly speaking, not another language, but a wonderful eclectic language, selected from the mass of languages used by civilized nations." Dr. Zamenhof's first step, it was explained, was to get together a list of roots that were already international. Then he completed his system of prefixes and affixes. Finding that this was not enough, he then added accepted root-words which were used in the greatest number of the Continental languages. By taking a vote and allowing the majority to win he added a great mass of words. Then for other ideas he was thrown back to the original Latin, or in a few cases evolved words himself. For example, he was compelled to think out a word for "husband" because he found that no two peoples had the same idea of what the thing meant, and Colonel Pollen added, "I told that to a woman once and she remarked 'That's nothing strange, no two women are agreed on the subject.'

#### HOW ESPERANTO ORIGINATED.

"What commends Esperanto most to us who are working in the cause," he said, "is the spirit which underlies it, the spirit which inspired Zamenhof. It was not to make money or fame that he

worked out the details of this language, for he is still a poor man. He was impelled by an ideal." The speaker told the story how when a boy Zamenhof had seen a feud between different races in his native town. He believed that because they spoke different languages, they did not understand each other, and so he dreamed the dream that when he became a man he would invent a language which they all might speak, and that thus their strife might be brought to an end. "His boy's dream," said the speaker, "cannot be realized, but he has invented a language that will bring the peoples together and will put an end to the wars that have involved all Europe." Dr. Zamenhof never expected, declared the speaker, that he would make bad people good, but he thought that if the nations understood one another, if they understood for what they were fighting, the severities of their quarrels would be mitigated. "When the peoples understand the peoples, kings will think before they go to war."

The speaker expressed his belief that Esperanto is the clearest and best language that could be invented. "There are other schemes," he admitted, "but none that is growing," and he pleaded with the Esperantists who were present not to be taken up with any of the modifications of the language but to follow their master "who knows," he said, "and who has thought out the difficulties of the language, and has dealt with those difficulties as only a master mind can, for Zamenhof was a great genius."

#### ESPERANTO WILL SUCCEED.

